

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Otto Bonte*

1. La luno jam leviĝis,  
Steletoj ekheliĝis,  
Ravante homojn nin;  
Silentas la arbaro  
Kaj super la kamparo  
Nebulo pala levas sin.

2. Ho, mondo la kvieta,  
Kaj kiel ŝajnas eta  
Krepuska en kovril';  
Por ke vi en ĉambreto  
Samkiel infaneto  
Senzorge dormu en lulil'.

3. Rigardu nun la lunon,  
Vi vidas nur duonon,  
Sed tamen ronda ĝi.  
Ni ofte ion ridas,  
Ĉar ni ne klare vidas,  
Ke ĉie regas harmoni'.

...

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Adolf Burkhardt*

1. Leviĝas luno; hele  
orpompas surĉiele  
la steloj al l'okul'.  
Arbaro mute revas;  
el la herbej' sin levas  
mirinde blanka la nebul'

2. Ripozas mont' kaj valo  
sub la krepusk-vualo  
trankvile kvazaŭ lag'.  
Por vi jen la permeso  
fordormi en forgeso  
la malbonaĵojn de la tag'.

3. La luno nur duone  
Prezentas sin impone;  
ĝi tamen estas sfer':  
Facile ni priridas  
aferon, se ni vidas  
nur parton de la plena ver'.

...

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1. La luno nun leviĝis,  
La steloj eklumiĝis,  
Subiĝis jam la sun'.  
Silentas la arbaro  
Kaj super la kamparo  
Nebulo blanka kuŝas nun.

2. La mondo ŝajnas kiel  
Hejmeca ĉambro, tiel  
Trankvila estas ĝi.  
Dormante ĉiun penon,  
Aflikton kaj ĉagrenon  
Dum nokta hor' forgesu vi.<sup>2</sup>

3.) Jen staras ĉe l' ĉielo  
Tre eta fora stelo,  
Sed tamen egas ĝi!  
Ja estas ofte aĵo  
Por ni nur ridindaĵo;  
Ĉar ne videblas ĝi al ni.

...

---

<sup>2</sup> alia versio:

2.) Aĥ, kiel trankvileca  
La mondo kaj hejmeca  
Vespere estas ĝi!  
En tiu kalma paco  
Ekdormu vi pro laco,  
Forgesu la aflikton vi!

|   |   |  |
|---|---|--|
| 4. ....<br>.....<br>.....<br>.....<br>.....<br>.....  | 4. Homidoj ni fieraj<br>pekuloj nur, mizeraj;<br>ne multon scias ni.<br>Ni teksas iluziojn<br>kaj serĉas multajn sciojn<br>kaj devojiĝas pli kaj pli.           | 4.) Ni homaj fieruloj,<br>Mizeraj ni pekuloj,<br>Malmulton scias ni!<br>Ni faras multajn aĵojn<br>Kaj artajn elpenaĵojn,<br>Sed vana estas tio ĉi.     |
| 5. ....<br>.....<br>.....<br>.....<br>.....<br>.....  | 5. Ho Di', nin lasu vidi<br>la Savon, ne plu fidi<br>vantaĵojn de l' pasem'!<br>Nin faru simpl-animaj,<br>infane Dio-timaj<br>en ĝoj', jam nun sen zorga trem'! | 5.) La Dian savon vidu<br>Ni nur kaj ni ne fidu<br>je vanta iluzi'!<br>Ni malfieraj iĝu,<br>Ni ĝoju kaj piiĝu,<br>Infan-egalaj estu ni!                |
| 6. ....<br>.....<br>.....<br>.....<br>.....<br>.....  | 6. Vi fine, sen ĉagreni,<br>el mond' nin volu preni<br>per milda morto for.<br>Nin tiam al ĉielo<br>venigu, al la celo:<br>Vi, nia Dio kaj Sinjor'!             | 6.) Finfine vi nin prenu<br>El tiu mond', ĉagrenu<br>Ni ne pro tio ĉi!<br>Kaj kiam vi nin prenos,<br>Ho faru, ke ni venos<br>En vian regnon, kara Di'! |
| 7. Ekkuŝu nun, gefratoj,<br>De bona Di' ŝirmataj<br>Kun tuta la homar'.<br>Kar-Dio ne nin punu,<br>Trankvilan dormon donu<br>Kaj al malsana la najbar'! | 7. Gefratoj, nun ekkuŝu!<br>Vin nokta vent' ne tuŝu,<br>dum ŝirmas anĝelar'.<br>Indulgu, Di', nin grace,<br>por ke nun dormu pace<br>ni kaj malsana la najbar'. | 7.) Gefratoj, enlitiĝu,<br>Trankvile endormiĝu!<br>Noktiĝas ĉie ĉi;<br>Vin gardos nia Dio.<br>Li regas super ĉio.<br>Ĝis morgaŭ nun ripozu vi!         |
| ...   | ...   | ...  |

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de Otto Bonte.*

*Arg-394-779 (2007-03-26 22:31:58)*

*Tiu ĉi traduko estas publikigita en 1984 en “Esperanto aktuell”, la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj “Flavaj paĝoj”, sur paĝo 15 de la numero 6/1984. Mi, Manfred Retzlaff, detajppis la tradukon el tiu, en 2007-03-26. Enigis la tradukon de Otto Bonte d-ro Dirk Willkommen, la tiama redaktisto de “Esperanto aktuell!”, .*

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de ADOLF BURKHARDT (pastro, \*1929-04-10 – †2004-04-02).*

*Arg-394-780 (2007-03-27 19:07:21)*

*Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, prenis el la kantlibreto “Mia kantaro I”, dua eldono de Majo 1998, kompilita kaj eldonita de s-ro Josef Schiffer, Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio. Sinjoro Josef Schiffer donis al mi la permeson.*

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1989-09-10.*

*MR-013-2 / Arg-394-777 (2007-03-26 13:19:45)*

*Tiu ĉi traduko estas unue publikigita en 1984 en “Esperanto aktuell”, numero 6/1984, la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj “Flavaj paĝoj”, paĝo 15. Enigis ka tekston de la traduko la tiama redaktisto d-ro Dirk Willkommen. Mi, Manfred Retzlaff, ŝanĝis en 2007-03-26 nur la duan strofon, kompare al la teksto aperinta en “Esperanto aktuell 6/1984”.*